

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 2/2003

Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Aprilo 2003

This issue of *Esperanto USA* is brought to you through the selfless support of the Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso.

Look inside for:

Izolite Por Esperanto	3
Ŝanĝoj en la C.O.	4
Evaluate Yourself: Tests	5
Recenzo: Maskerado	5
USEJ	5
Sankta-Luisianoj	6
New Books	9
Korespondantoj	10-11

Nun haveblas ĉe ELNA: Pasporta Servo 2003. Nomoj kaj adresoj de 1286 Esperantlingvaj gastigantoj en 80 landoj. Ĉu vi havas tiun utilegan pasporton al la tuta mondo? Kaj ĉu vi mem jam aliĝis al tiu gastiga reto? Mendu ĉe ELNA PAS002/ \$16.00. (Limigita stoko.)

Esperanto-Aktivado en Sankta-Luiso

de Jerry Johnson

Esperantistoj aktivadis multe en Sankta-Luiso dum la pasintaj cent jaroj. Ĝi estas unu el la lokoj kie komenciĝis la Esperanto-movado en Usono. Laŭ Edmond Privat (*Historio de la Lingvo Esperanto*, p. 77), "Ankaŭ en Ameriko societoj kaj grupoj fondiĝis multnombre inter 1907 kaj 1909 speciale en Brazilio kaj Usono, kie jam ekzistis movado komencita kelkajn jarojn pli frue dum la Ekspozicio de St. Louis. Tie sinjoro Twombly aranĝis Esperanto-standon kun helpo de eŭropaj grupoj." Tiu sinjoro Twombly estis Bostonano John Fogg Twombly, kunfondinto de Amerika Esperanto-Asocio en 1905, kaj redaktisto de *Amerika Esperantista Revuo* 1907-1908. En pli lastatempaj jaroj, ELNA okazigis sian landan kongreson en nia urbo en 1959, en 1967, kaj en 1999.

Dum la pasintaj dudek jaroj, la ĉefa instiganto por la Internacia Lingvo estis Doktoro Ron Glossop, Profesoro de Filozofio ĉe Sud-Ilinojsa Universitato en Edvardsvilo. Doktoro Glossop multe laboradas por paco kaj mond-civitanismo. Li mem decidis ke la mondo bezonas unu neŭtralan lingvon, kaj li menciis tion dum prelego kiun li prezentis pri mondpaco. Post lia prelego, unu el la aŭskultintoj, John Sabin, alproksimiĝis al li por informi al li pri Esperanto. Baldaŭ post tio Ron komencis lerni la lingvon, kaj post

mallonga tempo li komencis instrui ĝin.

En Septembro 1984, Ron invitis plurajn Esperanto-parolantojn al sia hejmo por konversi en la lingvo. Kutime ni kunvenis dimanĉe je la posttagmezo. Kelkaj el la tiamaj membroj de la grupo estis Duncan kaj Pat Charters, Jason Curtis, Joe Eisele, Stefano Gerrie, Jerry Johnson, Rod Mason, John Sabin, Jeff Wilson, kaj Audrey Glossop. Nur malmultaj el tiuj lernis Esperanton de Ron Glossop. Profesoro Duncan Charters proprarajte estas bone konata Esperantisto. Joe Eisele estis la plej maljuna membro de la klubo; li estis sperta, delonga Esperantisto, kaj li vivis ĝis 1990. John Sabin ankaŭ estis delonga Esperantisto; li vivis ĝis 1997. Stefano Gerrie estis tre sperta Esperantisto kiu antaŭe loĝis apud Sanfrancisko kaj konis multajn Esperantistojn el tiu regiono.

Dum la unua kunveno de 1989 la grupo decidis organizi sin. La unua estraro konsistis el Rod Mason, prezidanto, Jeff Wilson, vicprezidanto, kaj Stefano Gerrie, sekretario/kasisto. La grupo decidis ke ĝi devas kunveni ĉe publika loko por allogi interesojn kiuj hezitus veni al privata hejmo. Ili elektis la Bibliotekon Carpenter apud Avenuo

Daŭrigo sur p. 2 – SL

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Don Coleman, Peggy
Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow,
Orlando E Raola, Jacob Schwartz, Tim
Westover, David Wolf

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de
la Centra Oficejo:* Donald Harlow

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 39, No. 2

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow

☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉donh@esperanto-usa.org

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/ USONO

or by e-mail/aŭ retpoŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't neces-
sarily represent the point of view of ELNA
or its bulletin/La opinioj esprimataj en ĉi
bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne
nepre prezentas la vidpunkton de ELNA
aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2003/4/Limdato por
numero 2003/4: 28.07.2003

SL – Daŭrigo de p. 1

Sud-Grand kiel la lokon por la
kunvenoj. Ili elektis la trian
dimanĉon de la monato kiel la daton
por la kunvenoj. Sed la membroj de
la grupo ne povis konsenti pri ĝia
nomo. Finfine en septembro 1989,
sufiĉaj membroj konsentis ke la
nomo de la grupo estos “La Espe-
ranto-Asocio de Sankta-Luiso”.

La nova klubo havis plurajn
interesajn eventojn. Ĝia unua
Konversacia Rondo (KoRo) okazis la
3-an de novembro 1989 ĉe la
restoracio Olive Tree Cafe apud
Avenuo Sud-Grand. La 17-an de
decembro de tiu jaro la klubo festis
sian unuan Zamenhofan Bankedon
ĉe la Restoracio Plush Steer.

Tamen, la asocio ne nur
kunvenis kaj manĝis: dum
septembro, 1989 la klubo helpis
bonvenigi grupon de Polaj
Esperantistoj al Sankta-Luiso. Lusi
Harmon (de la Esperanta Vojaĝo-
Servo) informis nin ke aŭtobuso
plena de Polaj Esperantistoj alvenos
al Sankta-Luiso, kaj petis nian
helpon. La klubo kontaktis frataran
societon “Polish Falcons” kiu
donacis sian halon por festeto por
la veturantoj. Membroj de la klubo
donacis manĝaĵojn por la festeto.
Kelkaj membroj gvidis la Polojn al
vidindaĵoj en nia urbo – la Arkego,
la Malnova Katedralo, ktp. Post unu
tago, la Poloj forveturis aŭtobuse.
Estis interesa evento, sed estis
multa laboro por nia malgranda
grupo.

Dum la jaro 1991 du novaj
interesitoj ĉeestis niajn kunvenojn,
Peggy Dolter kaj Stanley Glass. En
1992 Stanley komencis sian
dejoron en la ofico de kluba
sekretario/kasisto. Li ankaŭ
redaktis la monatan kluban
novajleteron, kaj daŭre strebis por
plibonigi ĝin. [En 1997 ELNA premiis
al la klubo trofeon por la plej bona
novaj-letero.] La Restoracio Olive
Tree Cafe ĉesis ekzisti, kaj pro tio
la loko de la KoRo ŝanĝiĝis al la
Restoracio Lettuce Leaf en Klejtono.
Cetere, en marto 1992 la grupo
havis novan lokon por siaj
kunvenoj, la Publika Biblioteko de
Universitato-Urbo. Tie ni kunvenis
en malgranda ĉambro, en kiu povis
sidi nur kvar aŭ kvin personoj. En
decembro 1992, la kvara Zamenhofa
Bankedo okazis, la unuan fojon ĉe

la Restoracio Jordan's.

Ĉirkaŭ 1994, la Restoracio Let-
tuce Leaf tute fermis siajn pordojn,
kaj pro tio la klubo komencis havi
la KoRon ĉe la Restoracio La
Patisserie apud Bulvarado Delmar.
En septembro 1994, ni komencis
havi niajn kunvenojn ĉe la
Biblioteko Buder apud Avenuo
Hampton. Ni ankaŭ komencis havi
du kunvenojn monate – unu tute
por lecionoj kaj la alia por lecionoj
kaj klubaj aferoj. Dum la sama
monato okazis la unua kluba
rostfesteto. En la somero de 1994 la
klubo ricevis premion de ELNA kiel
la plej bona malgranda loka grupo.

Eble en 1995 la klubo komencis
novan tradicion – havi kluban
ekskurson al interesaj lokoj en la
regiono. La unua kluba ekskurso
okazis en la Arto-Muzeo de Sankta-
Luiso. La sekvantan jaron la
ekskurso okazis ĉe la Botanika
Ĝardeno de Misurio. En 1997 la
klubo vizitis vinfarejon en
Hermann, Misurio.

En marto 1996 la unua KoRo
okazis ĉe la Kafeterio Salad Bowl
apud Bulvarado Lindell. En oktobro
1997 la klubo unue partoprenis la
Internacian Popolfoiron, kie ni
havis informotablon por distribui
informon pri Esperanto.

Tamen, certe unu el la plej
signifaj datoj okazis en julio 1999
kiam la Esperanto-Asocio de
Sankta-Luiso gastigis la Landan
Kongreson. Danke al la laboro de
klubaj prezidanto, Peggy Dolter, kaj
aliuloj, kaj malgraŭ la terure
varmega vetero dum la kongreso, la
47-a Jarkongreso de ELNA sukcese
okazis.

Dum la jaro 2000 la klubo
komencis eldoni elektronikan
gazeteton per la interreto. Danke al
Bob Clark, Dan Gibbons, kaj Lee
Miller la eldonado daŭris pli ol unu
jaro. Poste la elektronika gazeteto
evoluis al gazeto eldonita de pli
granda komunumo.

La loko por la ĉiumonata KoRo
ŝanĝiĝis denove, kaj la loko por la
klubaj kunvenoj revenis al la
Publika Biblioteko de Universitato-
Urbo. La klubo havas viglajn
konversaciajn rondon, iuj el kies
ĉeestantoj veturintaj tra pli ol cent
mejloj. Dum ni komencas la duan
jarcenton de Esperanto-Aktivado en
Sankta-Luiso, ni antaŭĝuas bonan
estontecon.

Novaj Membroj de ELNA

Tom & Suki Boydston (Waldron, WA)
Zoe Dansan (Washington, DC)
Tobin T Fricke (Berkeley, CA)
Martin Green (Framingham, MA)
The Harneys (Springfield, VA)
Steven Hawley (Bowling Green, OH)
Brian Hoort (Lansing, MI)
Christopher Horn (Bloomington, IN)
Lester C Hunt (Chicago, IL)
Hillari Hunter (Chicago, IL)
David Michael Jensen (Berkeley, CA)
Friederika Jinga (Palm Coast, FL)
Jackie Keith (Fredericksburg, VA)
Ed Kovach (Steubenville, OH)
Jonathan Majewski (Cupertino, CA)
Andrew McCarter (Saco, ME)
Michael McCauley (Dalhart, TX)

Christopher Mogil (Arlington, MA)
Jeffrey and Ushma Narvil (McDonough, GA)
Carl Offutt (Chicago, IL)
Amparo Persi (Palm Coast, FL)
Jason Reed (Pittsburgh, PA)
James Reynolds (Pasadena, TX)
Bob Russell (San Leandro, CA)
Rene Salm (Eugene, OR)
Wayne Schaefer (Batavia, IL)
Michael Shappe (Richfield, MN)
Don Swaner (Towson, MD)
Richard K Ware (Amherst, MA)
Jessye Weinstein (Concord, MA)
Patty Whitaker (Davis, CA)
David J White (Akron, OH)
William A White (Brookline, MA)

Kiel Propagandi Esperanton kiel Izolito

de Joel Amis

Pro la vasteco de Usono kaj la relativa malgrandeco de la usona esperantistaro, izolitaj esperantistoj sufiĉe oftas en ĉi tiu lando. Tial mi kredas, ke certe pluraj el vi trovos la sugestojn en ĉi tiu artikolo tre utilaj.

Dum la unuaj jaroj de mia esperantisteco mi mem estis izolito, do mi bone komprenas la problemojn de izolitaj esperantistoj. Loka propagandado estas unu el tiuj problemoj. Lokaj grupoj kutime entreprenas propagandajn (aŭ informajn) projektojn en siaj urboj aŭ regionoj, uzante la financajn kaj homajn rimedojn haveblajn ene de la grupo. Sed izolito, evidente, ne disponas pri tiaj kolektivaj rimedoj. Do, kion fari? Ĉu estas facilaj, relative malmultekostaj manieroj propagandi Esperanton aŭ informi pri Esperanto? Efektive jes, kaj jen kelkaj ideoj jam elprovitaj.

• **Librodonacoj.** Unue, traserĉu vian lokan bibliotekon por trovi ĉu haveblas priesperantaj libroj aŭ Esperanto-lernolibroj. Se vi trovas tiajn, nu, bone. Sed plej verŝajne vi ne trovos tiajn librojn, aŭ vi eble trovos nur malnovegajn, tute malaktualajn lernolibrojn. Nu, vi mem povas plibonigi ĉi tiun situacion. Kontakto (telefone, letere, k.s) la bibliotekon kaj demandu ĉu ili akceptus libron pri Esperanto (menciu ankaŭ la nomon de la proponata libro; *Esperanto: Learning and Using the International Language* estas bona donacolibro). Se vi ricevas jesan respondon, mendu la libron de ELNA kaj petu ke oni sendu ĝin senpere al la biblioteko (kompreneble kun konvena noto pri la celo de la libro). La nura problemo de ĉi tiu ideo estas, ke ĝi postulas iom da tempo kaj mono — tamen ne multe. Laŭ mi, ĝi valoras la investon.

• **Afiŝoj.** Jen aparte bona ideo por studentoj. Vi povas mendi la afiŝosieron de ELNA, aŭ vi mem povas desegni afiŝojn (nur certigu, ke la afiŝoj pozitive prezentas Esperanton; pli da mokado ni ja ne bezonas!). Certigu, ke ĉiu afiŝo havu la aktualajn kontaktinformojn de ELNA. Amase fotokopiu la afiŝojn kaj afiŝu ilin diversloke en la universitato aŭ en aliaj publikaj lokoj (plej bone oni afiŝu plurajn ĉiusemajne por ke la informado estu konstanta).

• **Alia bona ideo,** por tiuj kiuj havas personajn TTT-paĝojn, estas enmeti ĝeneralajn informojn pri Esperanto en vian hejmpaĝon. Krome, vi povas krei ligon de via TTT-ejo al la TTT-ejo de ELNA.

Do, nun vi havas kelkajn ideojn. Se vi sukcese plenumos ilin, vi verŝajne baldaŭ ne plu estos izolita! Kuraĝon!

Balotiloj flugas

Balotilojn por la estraro de ELNA ni dissendis la 18-an de aprilo al ĉiuj membroj de ELNA*. La limdato por ricevi ilin en la oficejo de ELNA estas la unua de julio, do ne prokrastu vian voĉdonon! Oni elektas ĝis tri el ses bonaj kandidatoj por estrarano. Verŝajne kvara kandidato estraraniĝos, tamen, por plenigi la postenon forlasitan de David Wolff, kiu demisiis meze de aprilo. (Multan dankon, David, pro via longdaŭra kaj fervora servado.)

Se vi ankoraŭ ne ricevis vian balotilon, bv. kontakti la Centran Oficejon por peti ĝin. Se vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon por 2003, ankoraŭ eblas aliĝi kaj voĉdoni. Novaj membroj kaj realiĝantoj ricevas balotilon kun siaj aliĝkvitanco kaj membrokarto.

* Ni dissendis la balotilojn, kompreneble, nur al la membroj kiuj estis pagintaj sian kotizon je tiu dato, kaj por kiuj ni havas adreson.

Flurry of Conventions

This year the annual ELNA convention in Boston is very conveniently situated to take advantage of traffic going to the North American Summer Esperanto Courses (NASK), in Vermont, an easy drive or bus ride from Boston. NASK starts the day after the ELNA conference ends. We expect more international participants than usual because of this happy coincidence, and hope that many people will take advantage of the occasion to participate in both events. The ELNA convention will be at MIT from July 3 to 6, while NASK will last three weeks, from July 7 to 25, at the School for International Training in Brattleboro, Vermont.

Members should have received information on both events, but if you need more, contact the Central Office, or visit ELNA's web site <www.esperanto-usa.org>.

NASK, as usual, is timed to end just before the start of the World Esperanto Conference (UK) in Goteburg, Sweden, July 26 to August 2. Young Esperantists

will have to choose, though, between NASK and the World Youth Conference (IJK), which will also be in Sweden, in Lesjöfors from July 19 to 26.

Another coincidence that some ELNA members are taking advantage of is that the General Assembly of the Unitarian Universalist Association of Congregations <<http://www.uua.org/ga>> will take place in Boston right before the ELNA conference – that is, from June 26 to 30. There are plans for an Esperanto booth at that conference. If you are interested, or can help with the Esperanto booth, please contact Neil BLONSTEIN at neil_nachum@yahoo.com.

Personaj ŝanĝoj en la oficejo

Pro la nesufiĉa jara enspezo de ELNA, la estraro decidis en Sakramento en junio de 2002, ke necesos maldungi la vicedirektoron de la ELNA-oficejo se la enspeza situacio ne pliboniĝas. La limdato post kiam oni devos fari la decidon estis la fino de februaro, 2003. La kasisto preparis raporton pri la financoj je tiu tempo, kaj, kvankam okazis etaj pliboniĝoj, la estraro decidis ke tiuj ne sufiĉis por ebligi daŭran dungon de ambaŭ oficistoj. Tial, fine de marto, la vicedirektoro de la oficejo, s-ro Don Harlow, ricevis de nia prezidanto oficialan sciigon pri maldungiĝo post la fino de aprilo.

Intertempe, en tiu ĉi rubriko kaj aliloke aperis informoj pri la financa malfacilaĵo, kaj pluraj membroj malavaris al ELNA. Kvardeko da homoj aliĝis al la Gvidrondo de ELNA, pagante pli ol la baza kotizo de \$40. Multan dankon al ĉiuj el ili, kaj al multaj aliaj membroj kiuj simple donacis al iuj el la fondusoj de ELNA.

Aparte elstaras la donaco de membro H. Neal Parker. Li donacis du monatojn da salajro por la vicedirektoro. Pro tiu donaco kaj la bona efiko de la aliaj, la estraro decidis ke eblas daŭrigi la dungon de Don ankoraŭ iom plu, kvankam la fundamenta financa situacio pliboniĝis ne sufiĉe por daŭra pludungado. Laŭ la nuna decido de la estraro, Don laboros ĝis la fino de julio 2003. Post tio, estos nur unu

plentempa dungito en la oficejo, la direktoro (tio estas mi).

Tamen, oni neniam supozis ke la oficejan laboron ĝis nun faratan povas efektive fari nur unu homo. Necesos multe pli utiligi la helpon de volontuloj, simpligi kaj pliefikigi kelkajn taskojn, kaj verŝajne rezigni pri kelkaj servoj. Mi persone tre bedaŭras la neceson maldungi la vicedirektoron, ĉar li bonege laboris, kaj kelkaj el niaj servoj pliboniĝis pro li.

Dum siaj lastaj monatoj en la CO, Don (kaj kelkaj spertaj volontuloj) helpas plibonigi la komputilojn kaj programojn en la oficejo por plifaciligi la laboron. Ni esperas malnecesigi la plimulton el la ripetado de datumentajpado kiun ni ĝis nun devas fari pro la antikva ekipaĵo.

Volontulojn ni bezonas!

Ni pli ol antaŭe bezonas volontulojn kiuj pretas helpi en la laboro. La listo de eblaj taskoj estas longa kaj ankoraŭ detaligata. Iuj el ili devas esti farataj en la oficejo, do taŭgas nur por tiuj kiuj loĝas en la regiono de la Sanfranciska Golfeto, sed aliaj povas esti farataj per Interreto, do estas fareblaj ie ajn en la mondo.

Unu ekzemplo de tia tasko estas kribri retpoŝtajn mesaĝojn kaj dissendi ilin al la taŭgaj retadreso por pritrakto aŭ forĵeto. La Centra Oficejo ricevas 100-200 retmesaĝojn ĉiutage, sed la plimulto el ili estas reklamaĉoj ("spamaĵoj") tuj forĵeteblaj. Tamen, post la malapero de la dua oficisto, mi certe ne havos tempon trakribi ilin ĉiutage.

Alia tasko rilata al tiu estas respondi iujn specojn de retmesaĝoj, ekzemple, bazajn informpetojn. Ni havas informaron kiun ni sendas rete al bazaj (unuafaj) informpetantoj, sed ĉar ili tre ofte enmetas ankaŭ individuajn demandojn aŭ komentojn, estas preferinde skribi almenaŭ etan personan letereton por sendi kun la informaro, kaj eventuale respondi rekte iliajn specifajn demandojn.

Tiuj estas ekzemploj de taskoj fareblaj ie ajn, sed estas ankaŭ aliaj. Se vi interesiĝas kaj povas trovi iom da tempo helpi nin, bv kontakti min en la oficejo.

ESPERANTO TESTS—What good are they?

de Doroteo HOLLAND

Maybe you're just curious about how much Esperanto you have really mastered. Or perhaps you'd like to start teaching a class in your local community, but you're not sure you could do a good job of it. In either case, taking one of our Esperanto examinations—basic (Komencgrada), intermediate (Duagrada), or advanced (Supera) — is as easy as 1-2-3:

- 1) Decide which level fits your needs. If in doubt, send for a syllabus detailing the test contents.* Enclose a self-addressed, stamped envelope.
- 2) Find a local Esperantist or a local teacher (of any subject) who agrees to administer your test. (No knowledge of Esperanto is necessary.) The only equipment needed is a tape-recorder (two for the "Duagrada").
- 3) Send us* the name and address of your test administrator, the test-level you desire, and a \$5 check (made out to Dorothy Holland), and we will mail instructions and the necessary materials to your administrator.

That's all there is to it! If you pass, you will receive an official certificate. If you do exceptionally well, it will say "with distinction". If you don't pass, all is not lost; you may take the test again at a later date (after further study, of course!).

*Usona Ekzamena Servo
5140 San Lorenzo Drive
Santa Barbara, CA 93111-2521

Once you receive your certificate, you can frame it, show it to your friends (a great way to introduce the subject "What is Espe-

ranto?"), or use it for qualifying for teaching in adult education or to assist an elementary-school instructor.

Here's another scenario. Suppose you are considering attending a certain college whose foreign-language requirement for graduation you can't meet without taking a language course on which you'd much rather not spend your time and energy. That's when Esperanto can sometimes come to the rescue. Here's a report of a recent example from ELNA member Peter Catlin, who had taught himself Esperanto and had recently enrolled in Kenyon College in Gambier, Ohio.

"Kenyon requires all its students to have one year of college-level study of another language, or equivalent thereof, to graduate. Most incoming freshmen satisfy this requirement by means of a proficiency test administered during orientation; tests are offered in all the popular languages, such as Spanish, French, and German, and the college has a standing offer to provide tests in other languages if the student so desires.

"When I saw that standing offer, I immediately thought of my Esperanto study. I didn't expect that the college would be able to provide me with a test for a language as esoteric as Esperanto, but I'd just joined ELNA, and there heard about the Examination Service. Putting two and two together, I called the Modern Languages department and asked if I could use Esperanto as my language, with the facilitation of the Examination Service.

"From the beginning, Prof. Cowles (chair of the department and professor of French) liked my idea. There was never any objection made to Esperanto's validity as an actual language; indeed, the subject never arose... I think that one of the reasons she was so amenable to the idea was that I'd already done the

work of finding a testing service, so the ML department had little to do other than to actually administer the test..."

So Peter took the basic Esperanto test and earned a certificate "with distinction", thus fulfilling Kenyon's College's graduation requirement in foreign languages.

He was fortunate to be associated with a college willing to acknowledge that Esperanto is a bona fide language. Not many do. Fortunately San Francisco State University gave academic credit for the 3-week summer Esperanto courses given there for many years, and the School for International Training in Brattleboro, Vermont, is continuing that tradition. Some years ago, ELNA member Steve Belant and his father led a valiant but unsuccessful effort to persuade the California Department of Education to classify Esperanto as a language (American sign language was already so designated).

On May 15, for only the second time ever, *Incubus* was shown in a theatre in New York, the Brooklyn Academy of Music's BAM Cinemathek. The place was sold out, and the producer, Tony Taylor, fielded questions afterwards. A discussion of Esperanto was part of the q&a. Mr Taylor said he had heard that there were many errors in the film, but since no one involved in the making of it spoke Esperanto it's only when Esperantists point them out at screenings that he becomes aware of them. I regretted not having any materials with me, since my questions set off a wave of interest in the language.

The film will be screened at the Pacific Film Archive in Berkeley, California on July 16.

Reported by Mitch Abidor

Recenze

[La jena recenzo, verkita de longtempa esperantisto Rob Hardy, aperis unue en Amazon.com kaj rilatas al la anglalingva traduko de la originale Esperantlingva libro. En la nuna momento, ELNA disponas nur la Esperantlingvan version de la libro.]

Soros, Tivadar: Maskerado ĉirkaŭ la morto. Kun antaŭparoloj de Paul kaj George Soros, komentario de Humphrey Tonkin. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2001 (2a eldono). 318p. ISBN 92 9017 073-5. Ĉe ELNA: Kodo MAS001, Prezo \$26.90.

9 January – “Life is beautiful – and full of variety and adventure. But luck must be on your side.” So begins a remarkable memoir of Jewish life under the Nazis in Hungary, *Masquerade: Dancing Around Death in Nazi-Occupied Hungary* (Arcade) by Tivadar Soros. Soros was a thoroughly remarkable man who certainly had variety and adventure in his life, and as to luck, Jefferson is supposed to have said, “I am a great believer in luck and I find that the harder I work, the more of it I have.” Soros tells us repeatedly in his book that he didn’t like working hard, and he always looked for the easy way out, but even if that is so, he repeatedly used his resourcefulness and skill with people so that luck went his way. There are many accounts of the horrors of the Holocaust, and Soros certainly does not minimize the death and terror that he witnessed. Unlike many such accounts, however, this is a story of optimism and triumph. Soros and all his family survived.

Soros had had brushes with history before. He had escaped from a prisoner of war camp in World War I and made his way through Siberia. He made a raft to drift to the ocean, only to find out belatedly that all Siberian rivers drain into the Arctic. Somehow he got to Moscow, and became a leader in the Esperanto organization there, only to get caught up in the Russian Revolution. He was able to escape again and return to Hungary. He became a lawyer, and perhaps because of all the difficulties he had been through he was “never too ambitious.” He was moderately prosperous and well known.

His memoir begins in 1944. Before that time, Hungary was in a forced alliance with Germany because of “a notion that maintained, in essence,

that Germany had the free and open right to occupy territory in Eastern Europe if that would ensure a better life for the German people.” The occupation did not happen until March 1944, and came as a surprise to Soros and his friends, who had forgotten or ignored the possibility that such a thing could occur. The Germans adopted against the Jews what Soros calls a master-stroke, one that had worked efficiently in other occupied countries. They appointed a Jewish Council of the most prominent leaders of the Jewish community, and made them responsible for compliance of other Jews. “Of course, their own skins were at risk: if they did not comply they would be the first to be punished; if they did, they would be safe – or so they thought. They appealed to the Jewish Community earnestly, almost desperately, to follow orders. As they were respected citizens, their word carried weight. They succeeded in convincing themselves that they were serving the Germans not out of selfish motives, but in the interests of the Jewish community; as long as the Jews complied voluntarily their ill-treatment would be kept within bounds. Nothing could have suited the Germans better; they saved themselves the trouble and expense of having to enforce their own orders.” He reports that many were given summons from the council and simply showed up as directed for their internments and deaths. His experience as a prisoner of war had shown him that life had to be more valued than anything, and he argued “Since we can’t stand up to Hitler’s fury, we must hide from it.”

He and his family adopted “the natural phenomenon called mimicry: the animal takes on the color of its surroundings so that it is hard to detect and can escape its tormentors.” They hid, but since they had to be seen in order to take care of daily needs, they took on the aspects of Christians. This involved his forming close relationships with a series of forgers, and once he took care of his immediate family’s documents, he took care of other relatives, and then friends, and clients. He provided false identities to probably hundreds of people, and he was always at risk in doing so. He learned that a valuable (and genuine) identification card was the monthly streetcar pass; complete with photo, it bore any name the bearer cared to give. By his services, he was able to make money, but only did so from richer clients who could pay. “If anyone asked for my help, one of my principles in life was never to say no – if only to avoid diminishing their faith in human beings.”

He and his family split up in order

to be more inconspicuous, and all had their adventures. Soros particularly seems to have had mother-in-law problems like no one before or since. She repeatedly thwarted his careful plans for her disposition, because she did not think things could possibly be as bad as others were telling her. “They can’t go around murdering innocent people,” she insisted; she was quite stubborn about it... ‘Murdering innocent people isn’t possible. It says so in the Bible’” Soros thereupon reflects, “In an odd way she was right: it simply wasn’t possible. Such things were happening around me, and I knew the facts, yet I continued to have this odd sense that somehow it wasn’t true. In fact, the feeling has never left me.”

Amidst narrow escapes and harrowing close calls, Soros kept a sense of humor which frequently emerges on these pages. He was pleased that some Christians had taken to wearing yellow stars in the principle of sympathetic opposition against the German goons, but reports he never solved one mystery: “People had stuck yellow stars on several statues and pictures of Christ in various parts of town. I never discovered whether it was the Jews or Gentiles who did it.” As a “Christian,” Soros was able to obtain cigarettes when those were denied to Jews, and since he didn’t smoke, he would leave them at a watchmaker’s, so that people with stars could get some. He went to the watchmaker to get his watch fixed, and asked the price. “How can you ask such a thing? It’s on the house,” the watchmaker said, and then whispered to the woman working beside him, “This is the Christian gentleman who brings us the cigarettes, you know.” Soros says, “At least the Jews got to see that there were still a few decent Christians.” Much of the humor is tinged with humane sadness; according to one of his sons, Soros used to say, “It is amazing how well people can bear the suffering of others.”

This wonderful memoir has been in print before. Soros, that practical idealist, as an Esperantist wrote the original in Esperanto in 1965, three years before his death. In libraries of Esperantists the book has been an outstanding volume from the literature the planned language has produced. It is here translated by Humphrey Tonkin, a linguist whose name is familiar to all American Esperantists. It includes brief, loving memoirs by his sons, one of whom, George, has become one of the world’s richest and most influential people. If there is room on your shelves for history with hope, written by a thoroughly humane and lovable man, this book is perfect.

—Rob Hardy

Sankta-Luisanoj

Mi prezentu al vi kelkajn Esperantistojn el la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso

Lee Miller, Columbia, Misurio

Lee: Mi estas ĉi tie en la vendejo "Wild Oats" kie ĉiumonate okazas la Konversacia Rondo de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso. Mi volas prezenti al vi kelkajn el la membroj en tiu grupo ... kaj jen la unua! Saluton, Ron [**Ron Glossop**, emerita profesoro de filozofio ĉe la Universitato de Suda Ilinojso en Edwardsville]. Ĉu vi povas diri kiel vi iĝis Esperantisto?

Ron: Saluton, Lee. Jes, certe, mi volonte parolos pri tio. En unu senco de la vorto mi estis "Esperantisto" antaŭ ol mi iĝis vera Esperantisto. Mi klarigu. Iam dum la jaroj 1977 aŭ 1978, kiam mi pensis pri la problemoj kiel ni povus aboli militon, la ideo venis en mian cerbon, ke ni bezonas unu mondan lingvon (duan tute fonetikan kaj iom facile lerneblan neŭtralan lingvon sen neregulaĵoj) por ke ĉiuj personoj povu lerni kaj uzi ĝin. Tiam ĉiuj homoj sentos ke ili estas parto de unu granda homara komunumo. Tio ŝajnis al mi bona strategio por superigi naciismon / tribismon, kiu ofte estas kaŭza faktoro en milito. Tiutempe mi ne eĉ aŭdis pri Esperanto. Mi nur havis la ideon de monda lingvo, kiu antaŭenigos la senton de solidareco inter ĉiuj personoj. Plue mi iom dubis ĉu tia lingvo iam ajn ekzistos. Mi sciis, ke mi neniam povos krei tian lingvon. La ideo estis nur malplena revo.

Lee: Interese! Kaj kiel vi finfine trovis Esperanton?

Ron: En la jaro 1978 mi prelegis ĉe la Komunuma Centro en Universitata Urbo pri la problemoj de milito. Post la programo viro (efektive tiu estis John Sabin, kiu poste estis membro de nia loka klubo dum jaroj, sed tiam mi ne konis lin) venis al mi kaj diris, "Ĉu vi ne scias, ke jam ekzistas ellaborita monda lingvo? Ĝi estas nomita 'Esperanto.'" Sekve mi decidis, ke mi devos serĉi informon pri Esperanto. Mi trovis iom da informo en enciklopedio kaj decidis, ke mi volas ekscii pli pri tiu lingvo.

Lee: Klare vi fakte lernis pli. Kiel tio okazis?

Ron: Tiam okazis kvazaŭ-mirakla serio de eventoj. Ĉar mi estis estro de

programo por eksperimentaj kursoj ĉe Sud-Ilinojsa Universitato en Edŭardsvilo (SIUE), mi eble havis ŝancon starigi kurson pri Esperanto. Iun tagon en la koridoro mi diskutis tiun eblecon kun la dekanino. Mi demandis al ŝi, "Sed kie mi trovos instruiston por tia kurso?" Precize je tiu momento Profesoro Rino Cassanelli de la Fakultato de Fremdaj Lingvoj marŝis preter ni. Li diris al ni, "Ĉu iu diris ion pri Esperanto?" Mi diris al li, "Jes. Mi volas starigi kurson pri Esperanto kaj mi tre bezonas instruiston." Li tuj diris, "Mi estos la instruisto por via kurso. Mi lernis Esperanton per mem-studado kiam mi estis dekelkulo en Italio. Ĝi estis la unua fremda lingvo, kiun mi studis." Do subite mi havis mian instruiston! Sekve, en la aŭtuno de la jaro 1979 mi havis iom neanticipitan ŝancon lerni Esperanton en kurso ĉe la universitato.

Lee: Dankon, Ron. Kaj saluton, Peggy! [**Peggy Dolter**, estrarano de ELNA]. Ĉu vi povas informi la legantojn kiel vi konatiĝis kun Esperanto?

Peggy: Saluton, Lee. Mi memoras ke mi aŭdis pri Esperanto en konversacio kun lingvisto ĉe la Universitato de Ilinojso, ĉirkaŭ 1990. Mi menciis la konversacion al mia karulo. En 1991, mia karulo fariĝis mia edzo, kaj ni translokiĝis al Sankta-Luiso. Ted estas instruisto pri kemio; studento en lia klaso hazarde rakontis al li ke ekzistas Esperanto-klubo en Sankta-Luiso, kaj Ted informis min. Mi ĝojis pro tio, ĉar tiam mi serĉis ion interesan por ekzerci mian menson—iun ŝat-okupon, do. Nu, tion mi trovis!

Lee: Ankaŭ vi havas interesan historion pri la trovo de Esperanto! Kion vi faris poste?

Peggy: La klubo tiam kunvenadis ĉe la biblioteko Carpenter, sur la strato Grand. Mi opinias tion taŭga: Ĉe ĝuste tiu biblioteko mi ricevis mian unuan bibliotek-karton kiam mi havis 5 jarojn! Cetere, ĉe ĝuste tiu biblioteko mi registriĝis kiel voĉdonanto, kiam mi havis 18 jarojn. Mi memoras ke mi estis la unusola virino ĉe la kunveno, kaj ke unu el la viroj surportis t-ĉemizon pri Doktoro Kiu (Doctor Who).

Ron Glossop estis tie, dum mia unua kunveno. Li montris la vort-finaĵojn "a" kaj "o" per la vortoj "ruĝa

pomo", sed ni ne kantis la kanton. Mi memoras ankaŭ ke ĉe unu el miaj fruaj kunvenoj Ron klarigis al mi pri "iĝ", uzante la frazojn "La arboj verdas" kaj "La arboj verdiĝas". Mi sugestis ankaŭ "Dio verdigas la arbojn" kaj li respondis ke tio estas gramatike ĝusta; mi fieris.

Lee: Bele. Vi bone parolas Esperanton. Kiel vi progresis poste?

Peggy: Dum pli ol jaro, mi iom progresis, malgraŭ manko de serioza studado. Kiam mi ekkorespondis kun virino itala la sperto tre helpis min. Ankaŭ ŝia tri-taga vizito al nia hejmo en 1995 tre helpis min! Cetere, en tiu jaro Ted kaj mi akiris komputilon kaj eniris la interreton. Mi pli kaj pli lernis Esperanton per babilado en babil-ĉambroj en la reto. Tie mi konatiĝis kun mia korespondanto norvega kiu estas pli sperta Esperantisto kaj do helpis min.

La unua kongreso kiun mi ĉeestis okazis en Detrojto en 1996. Tie mi parolis Esperante la tutan semajnfino. Kia valorega sperto! Kongresoj, kaj ĉiuj okazoj kiam oni parolis Esperante, helpis min pretiĝi por mia unua Eŭropa ferio, dum kiu mi konatiĝis kun geEsperantistoj en tri landoj.

Lee: Dankon, Peggy. Plaĉas al mi via rakonto. Kaj jen nia amiko Dan! [**Dan Gibbons**, muzikisto kaj bibliotekisto]. Ĉu vi povas klarigi kiel kaj kial vi interesiĝis pri Esperanto?

Dan: Hej, Lee. Estas bone vidi vin! Nu, mi respondu: Bertrand Russell kaj J.R.R. Tolkien. Kiel dekelkjarulo mi legis ilin avide. Russell skribis dekojn da libroj pri ĉiaj temoj: filozofio, historio, politiko, lingvo, edukado. Lia pensmaniero kaj skribstilo ravis min. Antaŭjuĝoj for! Ni esploru ĉiun problemon freŝmense, pensu klare kaj logike, sekvu la spurojn de la vero ien ajn. Mi ne memoras ĉu li menciis la internacian lingvon, sed sendube Russell aprobis la celojn de la Esperanto-movado. Ĉe li mi lernis espereman idealismon, kaj sanan malestimon por la opinio de la plimulto.

Mi mencias Tolkien pro tio, ke dum tri aŭ kvar jaroj mi skribis flue per la elfa. Ne temas pri la elfa lingvo—tion li ne priskribis sufiĉe detale en "La

Daŭrigo sur p. 8 – SL

SL – Daŭrigo de p. 7

Mastro de l' Ringoj". Nur la skribsistemon mi mastris. Ĉu mi lernis por komuniki kun elfoj el ĉiuj regionoj de la mondo? Ne. Ĉu mi supozis, ke la mondvasta enkonduko de tia alfabeto haltigus la militadon inter elfoj, gnomoj, orkoj, ktp? Ne. Mi simple ŝatis la belajn literojn. (Eble mi ankaŭ fieris pro scipovo, kiu apartigis min de aliaj junuloj. Eble mi lernis la elfan skribsistemon ĝuste pro tio, ke neniu normalulo uzas ĝin. Hmm...)

Poste mi forgesis la elfan, kaj mi ne plu studis la verkojn de Russell. Gitaristo mi fariĝis, kaj mi celis mastri nur la universalan lingvon Muziko. Sed en 1984, mi hazarde trovis malnovan, brunan volumeton (J.C. O'Connor: Esperanto, The Student's Complete Text Book, 1903) en vendejo de antikvaj libroj. Dum mi turnis la sekajn, flavajn paĝojn kun kreskanta entuziasmo, mi aŭdis la voĉon de mia malnova amiko Bertrand Russell enmense: "Jen bonega ideo! Kiel simpla, kiel utila!" (Kaj la interna elf-amanta dekkvin-jarulo diris, "Kiaj interesaj ĉapelitaj literoj!") La libron mi aĉetis kaj aŭde studis dum kelkaj semajnoj. Mi supozis, ke neniu alia Esperantisto ekzistas en la mondo. Ne gravis. Esperanto estu mia propra lingvo, mi pensis. Eble post kiam mi spertiĝos mi reenkondukos ĝin al la mondo...

Lee: Kaj kiel vi poste spertiĝis?

Dan: La vortaro en la lernolibro ne sufiĉis. Mi vizitis librovendejon. Bonvole traserĉu la katalogon, sinjoro... Ĉu ekzistas... Jes! Montagu C. Butler: *Esperanto-English Dictionary*. Ekzistas do aliaj parolantoj! Mi mendis la vortaron, kaj anticipe atendis dum naŭ longaj semajnoj. Finfine ĝi alvenis, kia feliĉo! Sed ĉar oni povas per ĝi traduki nur el Esperanto anglan, mi devas longe vagi tra la paĝoj por trovi la ĝustan vorton por iu dezirata angla termino. Tamen plue mi studis, tradukis, progresis.

Ĉiu rakonto instruas lecionon, ĉu ne? (Sed malofte tiu evidentiĝas. Oni devas mem elpensi la instruon.) Jen prova devizo por mia E-historio: Ĉiuj atingas la landon Esperantio per diversaj, serpentumaj vojoj. Aŭ, pli proverbe: Alvenas ĉiu frato laŭ sia propra pado.

Lee: Post lernado, kial precize vi decidis daŭre esti Esperantisto aŭ Esperanto-parolanto?

Dan: Dekomence mi amis la lingvon

pro tio, ke ĝi estas facile lernebla, belsona, kaj fleksebla. Mi devas konfesi, ke amuzis min koni lingvon "privatan". Nur poste, kiam mi renkontis aliajn Esperantistojn, mi ĝojis pro tio, ke la lingvo ligas min al aliaj homoj, kiujn mi ŝatas.

Lee: Ĉu iam okazis io aparte interesa al vi per Esperanto?

Dan: Antaŭ kelkaj jaroj mi aŭdis pri projekto de UEA kiu nomiĝas Indigenaj Dialogoj. Ĝi celas instrui Esperanton al homoj el diversaj indigenaj grupoj, por ke ili povu interkomunikiĝi kaj kunlabori. Per la interreto mi servis dum kelke da tempo kiel interpretisto kaj helpanto por studanto el Barato. Mia enmiksiĝo en tiu projekto intruis al mi multon pri diversaj homoj kaj kulturoj.

Lee: Dankon, Dan. Via vivhistorio en Esperantio estas tre interesa. Nu, ĵus alvenis **Jerry Johnson**. Saluton, Jerry! Ĉu vi volus diri ion pri via vivo kun Esperanto?

Jerry: Bonan vesperon, Lee. Jes, certe. Mi ĉiam havis intereson pri foraj landoj. Kiam mi estis knabo, mi prunteprenis librojn pri aliaj landoj de la publika biblioteko. Mi klare memoras ke iun tagon mi rigardis kelkajn vortojn el la hispana lingvo sur paĝo de iu lerneja libro. Mi tiam scivolis kiel oni povas uzi tiajn vortojn por fari frazojn. Por trovi respondon al tiu demando, mi iris al la publika biblioteko kaj serĉis librojn pri la hispana lingvo. Bonŝance mi trovis plurajn verkitajn por junuloj. Mi prunteprenis iujn, kaj mi komencis mian mem-studadon de fremdaj lingvoj. Mi supozas ke tiu afero okazis dum la kvina jaro de la elementa lernejo.

Kiam mi pliaĝiĝis, mi enklase studis la hispanan lingvon dum la kvar jaroj de la mezlernejo. Iun tagon mi vidis artikolon pri "internacia lingvo" sur la ĉefpaĝo de la ĵurnalo St. Louis *Globe-Democrat*. Ĉi tiu lingvo kun regula gramatiko tre interesis min. Mi supozas ke mi trovis libron pri Esperanto en la publika biblioteko kaj legis ĝin. Mi ne memoras kiam aŭ kial aperis la artikolo, sed nun mi supozas ke eble ĝi aperis pro la Landa Kongreso en Sankta-Luiso en 1959.

En 1960 mia universitata studado komenciĝis en Rolla (Misurio), kaj mi trovis Esperanto-klubon tie. La respondeculo por la klubo estis Profesoro Brewer, instruisto de muziko ĉe la universitato. Estis tri aŭ kvar aliaj studentoj kiuj ĉeestis la klubajn kunvenojn. Mi aĉetis lernolibron kaj

komencis studi la lingvon.

Lee: Mi memoras ke vi iam diris ke vi ne restis membro de tiu universitata grupo, pro multaj aliaj devoj. Kio okazis poste, ke vi revenis al la lingvo?

Jerry: Pasis multaj jaroj. Mi diplomigis, edziĝis, kaj dufoje patriĝis. En 1978 mi revenis al Sankta-Luiso. Post tiu jaro mi aliĝis al la Unitariana Eklezio, kaj dum loka interpreteja kunveno mi renkontis Profesoron Ron Glossop. Oni diris al mi ke Ron estas Esperantisto. Mi memoris mian antaŭan intereson pri Esperanto, kaj mi preparolis ĝin kun li. Ron diris al mi ke li instruas la internacian lingvon ĉe la Universitato de Suda Ilinojso. Post kelkaj semajnoj mi trovis min en lia klaso dum dimanĉaj posttagmezoj.

Lee: Estas klare ke Ron sukcesis instrui, kaj vi sukcesis lerni! Dankon, Jerry. Mi salutas nun du membrojn el la meza parto de la ŝtato, **Raĉelo Ruhlen** [Columbia, Mo.] kaj **Roberto Vegiard** [Fulton, Mo.]. Roberto, kiel vi interesiĝis pri Esperanto?

Roberto: Saluton, Lee! Mi unue interesiĝis pri Esperanto kiam mi studis ĉe la Universitato de Kansas-Urbo en la jardeko de mil naŭcent kvindek. Mi ne memoras multajn detalojn, sed mi scias, ke mi sorĉiĝis kun la ideo de neŭtrala internacia lingvo. Jarojn poste, mi aŭdis Ron Glossop kiu parolis ĉe la Kolegio Westminster en Fulton. Li parolis pri la gravo de internacia lingvo por komunikiĝo inter nacioj. Li diris ke ni jam havas Esperanton, do ni ne devos inventi novan lingvon. Li ankaŭ diris, ke se ĉiuj lernus Esperanton, ni povus komunikiĝi kune. Poste mi aĉetis librojn kaj ekstudis malrapide ĉi tiun lingvon bonegan. Mi trovis la retpaĝon de ELNA kaj per tiu ĉi mi konsciigis pri la klubo en Sankta-Luiso. Mi ne studis multe, do mi lernis malrapide, sed mi ĝuas la lingvon kaj la filozofion esperantajn.

Lee: Dankon, Roberto. Estas granda plezuro por mi ke vi partoprenas nian lingvon kaj grupon! Kaj Raĉelo, kion vi dirus al niaj legantoj?

Raĉelo: Dum mi deĵoris en la Nacia Gvardio, mi aŭskultis iun diranta ke li indigniĝas kiam homoj parolas hispane en publikaj lokoj. Mi protestis ke ĉiuj devus senti sin liberaj paroli siajn lingvojn. Li ne povis kompreni min. Tamen, kvankam mi estis pli komprenema ol li, mi mem parolis nur

Daŭrigo sur p. 11 – SL

NEW FROM THE BOOK SERVICE

To order books from ELNA: (1) Send order by regular mail, with check or credit-card number and expiration date, to: ELNA Book Service, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; (2) Order on-line with credit card at <http://www.esperanto-usa.org/retbutiko.html>

Note: if you order with payment by credit card and the book you want is not in stock, we will back-order it for you and charge your card only when and if it comes back into stock. This service is not available for payments made by check. Prices given are basic, before discounts for ELNA members.

Brazila akvarelo. *Vida Jerman.* 23 relative mallongaj sed belaj kantoj, originale prezentitaj ĉe la 87a Universala Kongreso en Fortaleza, Brazilo. Kun klariga libreto kiu enhavas plurajn kantotekstojn. 2003. Kompaktdisko: 34 min. 42". Kroatio. NEW.
BRA004 \$30.20

Feliĉaj la simplaj. *Waldo Vieira.* Translated from Portuguese by A. K. Afonso Costa. A series of 50 short (generally two-page) parables, each with its moral, dictated by the spirit Valerium. 1982. 114p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
FEL003 \$3.00

Goo estas facila ludo. An introductory training kit for what is arguably the most popular board game in the world. Contains a four-page introduction to the rules, strategy and tactics of Go (in Esperanto), a reduced-size (9x9) practice board, and sets of black and white stones. N.d. Japan. NEW.
GOO002 \$17.70

Homeopatio kaj spiritismo. *Lauro S. Thiago.* Translated from Portuguese by Carlos de Almeida Wutke. Hahnemann's homeopathic idea of medicine from a Spiritist

viewpoint. 1975. 36p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
HOM003 \$1.30

Išmael Gomes Braga. Zêus Wantuil. A short biography of the famous Esperantist and Spiritist author and translator. 1971. 41p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
ISM001 \$1.50

Kialo de l' vivo, La Léon Denis. Translated from French by Affonso Soares. Advice to those who suffer from life. 1982. 47p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
KIA004 \$1.50

Kio estas spiritismo? *Allan Kardec.* Translated from French by L. C. Porto Carreiro Neto. A beginner's description of the fundamentals of modern Spiritism. N.d. 161p. 185x135. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
KIO004 \$2.00

Konciza Etimologia Vortaro. *André Cherpillod.* Basic etymological information for approximately 15,000 word roots and other morphemes in Esperanto. Aimed primarily at the lay user who is interested in a wider stock of words, but not the scientific detail provided by Vilborg (*Etimologia Vortaro de Esperanto*). Also includes twenty different alphabets and syllabaries in use around the world. 2003. 503p. 205x150. Paper. Netherlands. ISBN 92 9017 082-4. NEW.
KON010 \$26.70

Konsolanto, La. *Francisco Cândido Xavier.* A Spiritist overview of science, philosophy and religion, dictated by the spirit Emmanuel. 1977. 190p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
KON008 \$3.90

Kristana agendo. *Francisco Cândido Xavier.* 50 chapters of advice on how to live your life optimally, dictated by the spirit André Luiz. 1991. 108p.

180x125. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
KRI004 \$3.00

Libro de la mediumoj, La. *Allan Kardec.* Translated from French by L. C. Porto Carreiro Neto. How to communicate with and channel spirits; one of the basic works of modern Spiritism. A sequel to *La libro de la spiritoj*. 1964. 430p. 180x135. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
LIB005 \$5.00

Pasporta Servo 2003. Pocket-size catalog of the Pasporta Servo hosting service for Esperanto speakers. Owner of the catalog, when traveling, has the right to make use of this network of 1286 hosts in 80 countries. 2003. 210p. 155x110. Paper. Netherlands. ISBN 83-900118-7-5. NEW.
PAS002 \$16.00

Paŭlo kaj Stefano. *Francisco Cândido Xavier.* Translated from Portuguese by L. C. Porto Carreiro Neto. A historical novel about St. Paul (Saul of Tarsus), dictated by the spirit Emmanuel. N.d. 543p. 185x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
PAU001 \$5.00

Sur la vojo al la lumo. *Francisco Cândido Xavier.* Translated from Portuguese by A. K. Afonso Costa. The history of the world from a Spiritist viewpoint, dictated by the spirit Emmanuel. 1972. 174p. 180x130. Paper. Brazil. NEW TO ELNA.
SUR012 \$3.90

Vortfarado en dek lecionoj, La. *André Cherpillod.* A simplified overview, in easy steps, of the system of word-formation in Esperanto as described by Kalocsay and Waringhien in the Plena Gramatiko. Each lesson concludes with a summary rule. 2003. 23p. 210x150. Paper. Francio. NEW.
VOR001 \$6.10

Deziras Korespondi

BELGIO

*44-jara fraŭlo, meza Esperanta nivelo, laboras kiel oficisto en telefonoficejo, kristana protestanto, interesas kristanismo, naturo, preferas samreligiajn kaj samregionajn korespondantojn. Philippe DE VOS, BRUGGE, <philippe.de.vos.Esperanto@skynet.be>

BRAZILIO

*19-jara fraŭlo, studento pri medicino, Esperanto-instruisto, interesas aliaj kulturoj, diversaj pensmanieroj, amikeco, pridiskuti ideojn, interŝanĝi spertojn, preferas paperpoŝton. Gabriel Ferreira CAMPOLINA, Rua Pedro Sigaud 360 apto 302, Grajaú CEP-30430-360, BELO HORIZONTE-MG, <gabrielcampolina@hotmail.com>.

*32-jara viro, komencanto, edzo, instruas edukon psikologion, interesas sciencaj aferoj, muziko, teatro, kino, vojaĝado, kulturoj, kutimoj, montogrimpado, ŝako. Dener Luiz da SILVA, Rua Vinte e um de abril 395, SÃO JOÃO DEL REI, MG 36302-014, <deneroso@yahoo.com.br>.

*37-jara fraŭlo, komencanto, interesas kulturo, sporto, muziko, legado, kolekti poŝtmarkojn, poŝtkartojn, monerojn, paperpoŝte. Luiz Correia BERNARDES Filho, Rua Catete 35, Barroca, BELO HORIZONTE MG, CEP: 30430-520, <lcbf.bhz@terra.com.br>.

ĈINIO

*39-jara komencisto, ĝenerala sekretario de Nanchang-a Esperanto-Asocio, interesas historio, edukado, vojaĝoj, poemoj, lingvoj, kulturo, Esperanto-movado, interŝanĝi Esperanto-informojn, komerco, turismo, tekniko, filatelo, arto. WEN Gang, Beijing Donglu 356 Hao, Sheng jijie shi gong Gongsi, NANCHANG, Jiangxi-provinco CN-330029, <venkon@public.nc.jx.cn>.

*40-jara viro, lingvo-instruisto. CUI

Jiayou, P.O. Kesto 448, LIXIN 158120, Jixi, Heilongjiang, <amikeco@sina.com>, <cuijiajou@yahoo.com.cn>.

FRANCIO

*27-jara viro, aktiv(em)ulo ĉe la Junulara Esperanto Franca Organizo, laboras en nacia elektra kompanio, interesas lingvoj, kuirado, dancado, babilado, amikeco, amemo, muziko, filmoj, humuro, interreto, gazetaro, libroj, psikologio, kolekti skribilojn, paperojn, librojn. Aleks KADAR, PARIS, <alekspekto@yahoo.fr>.

GERMANIO

*48-jara edzo, studas beletristikon kaj ĵurnalismon en akademio en Hamburgo, interesas literaturo, poezio, tradukado, B. Traven, amikeco, vojaĝado, muziko de Chopin, J. S. Bach, popolmuziko de Latin-Ameriko, gastigado de Esperantistoj. Hans-Georg KAISER, Wenzelstr. 12, DE-04600 ALTENBURG, <kaiser-altenburg@t-online.de>.

*51-jara edzino, financekonomi-istino, interesas literaturo, amikeco kun aliaj homoj, vojaĝado, kuirado, gastigado de esperantistoj. Dorothea KAISER, Wenzelstr. 12, DE-04600 ALTENBURG, <kaiser-altenburg@t-online.de>.

*56-jara solulo, meza Esperanto-kapablo, lingvisto, instruisto kaj tradukisto de angla, franca kaj hispana, interesas lingvoj, vojaĝoj, beleco de naturo kaj arto (ĉefe muziko), inventspirito de la tekniko, komputilaĵo, filozofio, pripenso de la vivsenco. Ŝatas labori en la naturo permane, gastigi vizitantojn en Germanio. Claus WINTERHOFF, NEUSS, <c.cogitat@t-online.de>.

GREKIO

Profesoro de lingvoj, kun viroj aŭ virinoj, volas korespondi kaj interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn. Bill XULIDIS, Klafthmonos 3, 546 34 THESSALONIKI.

HISPANIO

*21-jara knabino, komencanto,

studas telekomunikadon kaj informadikon, interesas muziko (metala kaj gota), literaturo, naturo kaj filmoj. Kristina MALDONADO BUENROSTRO, C/Juan Rejano 35 2º B, 14500 Puente Genil, CÓRDOBA, <lunagris10@hotmail.com>.

KROATIO

*58-jara viro, interesas bildkartoj, simpla vivo de homoj, prefere paperpoŝte. Stjepan ZARINA, Str. S. Kolara 27, HR 10410 VELIKA GORICA.

MAROKO

*23-jara fraŭlo, komencanto, inĝeniero-studento, interesas legado, filozofio, muziko. Mohamed GHARBI, 54 Rue Hasnouna N°:6, TANGER, <bagayogoo@yahoo.fr>.

NEPALO

*22-jara viro, interesas muziko, vojaĝoj, amikeco. Ajit Joshi, KATHMANDU, <ajit_aas@hotmail.com>.

NORDA IRLANDO

*29-jara viro, komencanto, studento, interesas arto, grafiko, poŝta arto, fari afiŝojn, tipografio, pentrarto, fotoado, lingvoj, kelta kulturo, muziko el la tuta mondo, vojaĝoj, iri al diversaj kafejoj, legi pri artaj temoj, naĝi, biciklado. Bharain MAC AN BHREITHIUN, BELFAST, <bharain@btinternet.com>.

POLLANDO

*15-jara knabo, komencanto, interesas lingvoj, sporto (flugpilko, teniso, korbopilko), vojaĝi kaj kolekti poŝtmarkojn. Maciej ZGONDEK, Slowicza Strato 22, 99-300 KUTNO,

<esperantisto@poczta.onet.pl>.

*32-jara komencanto, edzo, interesas scienc-fikcio, komputiloj, muziko, homa interkomunikado, vojaĝoj, aliaj kulturoj. Zbigniew MATCZAK, SZCZECIN, <zmatczak@poczta.onet.pl>.

*36-jara edzo kun du infanoj, meza kapablo pri Esperanto, interesas homa interkomunikado, vojaĝado, filozofio, politiko, geografio kaj

historio, ĉiutaga vivo kaj Esperanto-movado, kun homoj emantaj rakonti pri si kaj sia kulturo, vivmaniero, prefere paperpoŝte. Stanislaw DEBSKI, skrytka pocztowa 80, PL-90950 LODZ 1, <debski@poczta.onet.pl>.

PORTUGALIO

*22-jara viro, studas komputilarton, interesas esperantumi, tendumi, kafumi kun amikoj, kino. Nuno MAGALHAES, PORTO, <anaseto@mail.pt>.

RUSIO

*14 lernantinoj de murmanska lingvistika centro LINGUA, studentaj ĉefe la anglan lingvon, eklernis ankaŭ Esperanton kaj volonte korespondus kun anglalingvanoj por samtempe uzi ambaŭ lingvojn. Pere de la kursgvidanto, Aleksandras Julius MASIUKAS, prospekt Lenina 101-26, 183012 MURMANSK, <masiukas@mail.ru>.

*22-jara komercantino, studento de la Humanitara instituto, interesas arto, muziko, literaturo, vojaĝoj. Elena DAVIDENKO, ul. Sedova 24-116, 183075 MURMANSK.

*24-jara fraŭlino, komencanto, protestanta kredanto, interesas verki verkojn kaj muzikon, kulturo, kalendaroj, poŝtkartoj. Olga Valerievna SEVCHENKO, Str. Ordjonikidze 14-817, IJEVSK 426063, <amikino@rambler.ru>, <amikino@ukr.net>.

*32-jara komercantino, interesas filozofio, budhismo, orienta kulturo, klasika literaturo, klasika gitaro. OSTJUKEVIČ Svetlana, ul. Aleksandra Nevskogo 71-56, 183075 MURMANSK.

TAJVANO

*22-jara fraŭlino, interesas literaturo, filmoj, sportoj. TAIPEI, <jacintachang2002@yahoo.com.tw>.

UKRAINIO

*36-jara fraŭlino, instruisto kaj ekonomiisto ĉe Poltava Nacia Teknika Universitato, interesas homa interkomunikado, Agni-Jogo, Nikolaj Reriĥ, vojaĝoj, gitarludado,

studado, retpoŝte. Irina ŠMYGOLJ, Strato de Bajan 6-25, POLTAVO 36002, <irina@pntu.poltava.ua>.

USONO

*15-jara knabo, interesas lingvoj, verki poemojn kaj novelojn, muziko, enigmoj, volas interŝanĝi rakontojn pri siaj landoj. Daniel DAY, INDIA-NAPOLIS IN, <BlueBeacon3@aol.com>.

*35-jara komencanto, edzo, interesas kantado, muziko, novaj amikoj, lerni pri homoj en aliaj landoj, prefere paperpoŝte. Mark DIETRICH, 1530 Grotto St. N., ST. PAUL MN 55117, <josquin88@earthlink.net>.

*40-jara fraŭlo, komencanto, kristano, interesas ĝardenado, gastronomio kuirado, kristanismo, fotado, muzeoj, teatraĵoj, muziko, kinejo, naturo, tendumado, fiŝkaptado, piedvagado, vojaĝado. Timothy S. CAPEHART, 2620 Lawrence 2050, LARUSSELL MO 64848, <timhart62@hotmail.com>.

*50-jarolino, serĉas pli-malpli gesamaĝulojn, interesas ĝardenado kaj dombestoj, vojaĝado, klasika muziko, legi romanojn pri historio kaj mondaj aferoj. Annabella MAZ, Tucson Arizono, <esperantoZ@aol.com>.

VENEZUELO

*18-jara knabino, komencanto, studas ĉe la Universitato de Karabobo en Valencio, interesas legi mistero-librojn, lerni pri lingvoj, kulturoj, literaturo. Lisette HERNANDEZ RODRIGUEZ, Urb. Los Mangos, Av. 118 Res. TADMOR apto. 8-a, VALENCIA, <lisette@universia.edu.ve>.

SL – Daŭrigo de p. 8

unu lingvon. Mi ĉiam volis lerni alian lingvon. Mi studis la hispanan en mezlernejo kaj altlernejo. Kiam mi vizitis Honduras kaj Ekuador, mi provis paroli la hispanan, kun modera sukceso. Sed mi neniam parolis flue. Do, mi feliĉiĝis kiam mia edzo trovis Esperanton kaj volis lerni. Multaj jaroj de studado de la hispana kun instruisto

ne instruis al mi flue paroli. Mi nun estas okupita patrino kaj doktoriĝa studento. Esperanto estas sufiĉe facila ke eĉ mi povas lerni. Ankaŭ mia edzo kaj nia filino lernas. Esperanto estas ekanta familia afero! Lernante Esperanton kune, mia familio intimiĝas, kaj ni renkontis novajn esperantistajn amikojn. Ni jam ne estas tipaj unulingvaj usonanoj!

Lee: Estas mirinde, ĉu ne, kiel oni povas trovi amikojn per Esperanto? Dankon pro via rakonto! Nun mi parolu iomete al la alia Lee [**Lee Lewis**]. Saluton, Lee! Kiam vi unue aŭdis pri Esperanto? Kiel tio okazis?

Lee Lewis: Kaj saluton al vi, Lee! Mi unue aŭdis pri Esperanto proksimume en la jaro 1974. Mi havis 16 jarojn tiam, kaj vivis en la ŝtato de Vaŝingtono. Tiam mi ne sciis multon pri la lingvo. Post du jaroj, mi estis en la mararmeo kaj loĝis en Orlando, Florido. Mi legis artikolon pri Esperanto kaj lernis miajn unuajn vortojn en la lingvo. Inter ili estis la vortoj “rusto”, “lampo”, kaj “kaj”. En la jaro 1980, mi aĉetis mian unan vortaron en Esperanto (tiun de J.C. Wells), kaj komencis lerni pli serioze. Tamen, mi havis nenian kun kiu mi povis paroli, tial mi ne progresis tre rapide. En (eble) 1993/94 mi membriĝis en ELNA kaj UEA. En 1996 Mi membriĝis en FEL (Florida Esperanto-Ligo). Mi ĉeestis la unuan kunvenon de FEL kaj instruis kurson pri la “Klingona” lingvo ... EN Esperanto (mi ankaŭ provizis kurslibreton). Por la sekvanta jaro, mi laboris kiel la redaktisto de “La Verda Stelo” ... la revueto de FEL.

Lee: Precize kiel vi lernis la lingvon kaj kiam?

Lee Lewis: Dum la pli fruaj jaroj, mi aĉetis vortaron, kaj studis sole. Hodiaŭ mi havas la reton kiu helpas al oni lerni, kaj mi membriĝis en EASL kie mi (finfine!) havas aliajn homojn kun kiuj mi povas interparoli.

Lee: Jes, bone! Estas bele havi tian grupon, ĉu ne? Post lernado, kial vi decidis daŭre esti esperantisto?

Lee Lewis: Mi ne scias ĉar mi ankoraŭ lernas! Sed mi deziras porti Esperanton al pli da homoj kaj doni al ili la ŝancon lerni alian lingvon.

Lee: Kion vi dirus al la legontoj, se vi povus diri nur unu frazon?

Lee Lewis: Mi dirus, “Kiam mi disvastigas Esperanton kaj ĝian Movadon, mi faras mian parteton en la direkto de mondopaco”.

Ĝuu Vojaĝi kun Esperantistoj

When you travel with Esperantists, you add marvelous dimensions to your experience. Most Esperantists are more experienced travelers than your "ordinary" citizen for several reasons. Even if they have not traveled extensively before, they have had contact with people in different countries through mail or the inter-net; they have read more information from the standpoint of people outside their immediate circle, and Esperantists in general tend to be very inquisitive and a lot of fun.

Learning Esperanto is a much easier task than learning even the easiest of "foreign" languages. Therefore, it is much easier to feel comfortable using Esperanto - and you can use it in many countries. Reciprocally, someone from another country does not feel uncomfortable trying to speak or understand your idiomatic English. Esperanto allows for a far more equal "meeting" of minds and spirits.

As a representative of Esperanto or the Esperanto movement, we are discouraged from taking political points of view; but we are far more inclined to risk friendly discussions concerning points about which we disagree. It will be very interesting this summer to talk to my friends from around the world about their positions on terrorism and the aftermath of the war in Iraq.

When traveling as an Esperantist, one is not traveling as an American (from the United States), African, Albanian, Australian, Austrian, Belgian, Brazilian, Canadian, Chinese, Columbian, Costa Rican, Croatian, Cuban, Czech, Dane, Dutch, English, Estonian, Finn, French, German, Greek, Hungarian, Iranian, Irish, Islander, Israeli, Italian, Japanese, Jordanian, Yugoslav, Latvian, Lebanese, Lithuanian, Mexican, Nicaraguan, Korean, New Zealander, Norwegian, Pole, Portuguese, Romanian, Russian, Scot, Senegalese, Slovak, Slovenian, Swede, Swiss, Syrian, Togolander, Turk, Ukrainian, Venezuelan, or Vietnamese. (These are all countries I know more about either because of my Esperanto travels there, or because of Esperanto conversations with people from these countries.) WHEN TRAVELING AS AN

ESPERANTIST, ONE IS NOT LIMITED TO TALKING TO HOTEL CLERKS AND OTHERS IN THE TOURISM PROFESSION.

It is not too late to take advantage of various Esperanto gatherings this year which can broaden your knowledge and enjoyment through using Esperanto:

- ELNA 51st yearly convention - at Massachusetts Institute of Technology, Cambridge (Boston) - 3-6 July
- NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO (NASK) Brattleboro, VT - 3 weeks 7-25 July
- 59a IJK - Internacia Junulara Kongreso Lesöfors, Sweden - 19-26 July
- 88a Universala Kongreso de Esperanto 26 July - 2 August, Gothenberg, Sweden
- Esperanto Vojaĝ-Servo post-kongresa ekskurso - 3-9 aŭgusto - Estonio, Latvio, Litovio
- NOREK - Nord Okcidenta Regiona Esperanto Konferenco 5-7 Sept, Sidney B.C. Canada. Informo ĉe KEA, [250] 656-1767 aŭ ĉe Iwolemskatl@aol.com.
- "OKEMO" - 10a Internacia Semajnfino Esperantista, Okemo Mountain Resort, Ludlow, Vermont - 11-13 oktobro Informo ĉe <http://www3.sympatico.ca/esperanto/eo-okemo.htm>.
- Tri-Kalifornio Konferenco (AIS-ASM) - 31oct - 2 Nov Mexicali, Mexico. Kursaro de Esperanto, meznivela kaj supera. Details from iasmexico@mxl.cablemas.com.



ESPERANTO VOJAĜ-SERVO
6104 LaSalle Ave., Oakland CA 94611
[510] 339-2001 • LusiHarmon@aol.com

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040